

SEN KRISTO NE ESTAS EKLEZIO

Jesuo Kristo fondis Eklezion. La Eklezio ne estas, kiel asertas iuj teologoj, produktaĵo de deziroj de la kredantoj, por ke „la afero de Jesuo“ iel plu daŭru. Jesuo Kristo mem persone estas la fondinto de la Eklezio. Diras tion ankaŭ Katekismo de la Katolika Eklezio (KKE) tute klare:

„*Sinjoro Jesuo donis al sia komunumo strukturon, kiu daŭros ĝis la plena fino de la reĝejo. Antaŭĉie tio estas elekto de Dekduo kun Petro kiel ilia kapo. Per tio, ke ili reprezentas dek du israelajn tribojn (komp. Mat 19,28; Luk 22,30), ili estas fundamentaj ŝtonoj de la nova Jerusalemo (komp. Apo 21,12-24). Grupo de la Dekduo, sed ankaŭ la ceteraj disĉiploj partoprenas je misio de Kristo, je lia potenco, sed ankaŭ je lia sorto (komp. Mat 10,25; Joh 15,20). Per ĉiuj tiuj faroj Kristo preparas sian Eklezion (KKE 765).*

Plue: Kristo intence fondis sian Eklezion kiel komunumon. Ni povas ankaŭ imagi, ke Li povis nomumi nur unu sian posteulon sen ceteraj apostoloj.

En lasta parto de la apostola letero *Nuovo millenio inuente*, en sia animzorga programo por nova jarmilo, alvokas servanto de Dio Johano Paŭlo la Dua al tio, ke ni komprenu Eklezion kiel „misteron de la komunumo“, kies „koro“ estas la amo (NMI 42).

Jam mem nomo Eklezio estas tre elokventa. La vorto „eklezio“ indikas liturgian kolektiĝon, sed ankaŭ lokan komunumon aŭ la universalan komunumon de la kredantoj. Fakte tiuj tri sencoj estas integraj. La „Eklezio“ estas la homaro, kiun Dio kolektigas el la tuta mondo. La Eklezio ekzistas en la lokaj komunumoj kaj realigas sin kiel liturgia kolektiĝo, precipe aŭkaristia. Ĝi vivas el vorto de Kristo kaj lia korpo, kaj tiel ĝi mem iĝas korpo de Kristo (KKE 752).

La Eklezio daŭrigas tion, kion Kristo realigis per sia vivo sur la tero. La Eklezio plu daŭrigas mision de Jesuo kaj precipe en la sakramentoj ĝi faras tion, kion faris Kristo:

- Jesuo alvokadis homojn al konvertiĝo, liberigis ilin el la potenco de Malbonulo, alkondukadis ilin al Dio kaj fortigadis en la kredo – tion faras la Eklezio per la *sakramentoj de la bapto kaj konfirmacio*.

- Jesuo pardonis la pekojn. – La Eklezio tion faras per *sakramento de la pentofaro*.

- Jesuo Kristo transformigis panon kaj vinon je sia Korpo kaj Sango kaj Li mem sin donis al la apostoloj kiel nutraĵon. – La Eklezio tion faras per *sakramento de la Eŭkaristio*.

- Jesuo sanigadis malsanulojn kaj fortigadis ilin. – La Eklezio tion faras per *sanktoleumo de la malsanuloj*.

- Jesuo kunigis viron kaj virinon kaj benis ilin kaj Li altigis tiel geedzecan staton je sakramento. La Eklezio tion faras per la *geedzeca sakramento*.

- Jesuo metis sur la apostolojn manojn kaj donis al ili plenpovon pardoni la pekojn, transformigi la panon kaj vinon, paroli kaj agi lianome kaj nomumi siajn posteulojn. – La Eklezio tion faras per la *sakramento de la sacerdoteco*.

Ni do povas diri: **Sen Kristo ne estas Eklezio**. Sed same tiel sen Eklezio ne estas Kristo. Senpere post la Dua Vatikana Koncilio inter la teologoj disvastiĝis tiu ĉi diraĵo: „Dio jes, la Eklezio ne“. Tion ni jam danke al Dio superis. Eble ne plu ekzistas serioza teologo, kiu pledus tiun ĉi opinion. Sed tragika estas tio, ke inter la kredantoj tiu pensmaniero enradikiĝis kaj multaj supozas, ke sufiĉas la kredo je Dio aŭ je „io, kio estas ekster la mondo“, kaj ke la Eklezion ili ne bezonas. Dio jes, la Eklezio ne, tio estas, kvazaŭ ni dirus: Mozart jes, sed lia muziko ne. Tiel tion foje formulis episkopo Reinhold Stecher el Insbruck.

Kial tio tiel estas? Ĉar multaj homoj, inkluzive de la konsekritoj, verdire ne scias, kio fakte estas la Eklezio.

Kio estas la Eklezio?

La Katekismo donas tiun ĉi respondon:

SEN KRISTO NE ESTAS EKLEZIO

La Eklezio estas en la historio, sed samfoje ĝin transiras. Nur „per la okuloj de la kredo“ estas eble en ĝia videbla realeco ekvidi samfoje spiritan realecon, portanton de la Dia vivo.

La ununura peranto Kristo starigis kaj senĉese konservas sian sanktan Eklezion, la komunumon de la kredo, espero kaj amo ĉi tie surtere kiel videblan organismon kaj pere de ĝi Li verŝas la veron kaj gracon sur ĉiujn. La Eklezio estas la komunumo ekipita per hierarkiaj organoj kaj samtempe ĝi estas mistera korpo de Kristo, ĝi estas videbla kolektiĝo, ankaŭ la spirita komunumo, ĝi estas surtera, ankaŭ pridonacita per ĉielaj donacoj, ĝi formas efektivaĵon konsistantan el Dia kaj homa elementoj (KKE 770, 771).

La homoj nuntempe tendencas vidi nur malhelajn flankojn de la Eklezio, sed estas necese vidi ankaŭ ĝian pozitivan vizaĝon. La Ekleziaj Patroj ofte nomis la Eklezion kiel „casta meretrix“ – ĉasta pekulino. Ĝi estas kontraŭdiraĵo, kaj tamen pregnantanta. La Eklezio estas sankta (ĉasta) kaj iliaj mem-

broj estas ankaŭ pekantaj homoj (meretrix). Johano Paŭlo la Dua elparolis en la jaro 2000 grandajn petojn por pardono de la kulpoj faritaj de la filoj kaj filinoj de la Eklezio, sed ne de la pekoj de la Eklezio.

„Kristo amis la Eklezion...“ tekstas en la letero al Efesanoj (5,25). Kaj jen ekaperas la demando: Kio estas la Eklezio por mi? Ĉu mi sentas min kiel ano, membro de la Eklezio kaj ĉu mi konsciigās, ke la talantoj, kiujn mi ricevis per la bapto, estas prospere al la tuta Eklezio, kaj ke ankaŭ miaj pekoj estas ligitaj kun la tuta Eklezio? Ĉu la Eklezio estas mia vera Patrino? Konata estas la eldiraĵo de sankta Cipriano: *Ne estas ebla havi Dion kiel Patron, se ni ne havas Eklezion kiel Patrino* (Pri unueco de la Eklezio 6).

Al la ofte metata demando, kion oni devas en la Eklezio ŝanĝi, respondis la beata Patrino Tereza foje al la ĵurnalistoj per jenaj vortoj: „*Mi kaj vi.*“ Kaj aliffoje ŝi diris: „*Jes, sed kiu estas la Eklezio? Tio ja estas ni, vi kaj mi!*“ ■

-sks- 4/2008